27-a IF kaj urbeto Nördlingen invitas vin

Nördlingen atendas vian viziton ankaŭ ĉi-jare !

Rondiru la urbon - sur la komplete konservita urbo-murego (longeco ĉ. 3,5 km) kaj admiru la mezepokan originon. La urbodomo kaj la preĝejo estas malfrugotikaj, de sur la 90 m alta turo 'Daniel' vi ĝuas imponan panoramon. La centro, atingebla en nur kelkaj minutoj, estas bele restaŭrita *(vd. apudan foton)*.

La klerigejo apartenas al aŭstra asocio (ĝia unua en Germanio), inaŭgurita en septembro 2007, kaj ofertas luksajn ĉambrojn kaj salonojn. Ni disponas pri saŭno kaj etosoplena Knajpo *(vidu malsupran foton kun HDP el 26-a IF).*

Nördlingen > aŭtoŝoseo A7 = 27 km

■ **Nürnberg** 80 km

■ A 7 > ‖ ■ **Nördlingen**

Stuttgart 110 km

München ■ 120 km

Foto: HDP, L.Gabalda, R.Bouchet

27-a IF ▪ 30 decembro 2010 ▪ ekskurso al München

München invitas vin ...

Pasigu kun ni kelkajn horojn en Munkeno, konatiĝu kun ĝiaj vidindaĵoj, parolu kun lokaj esperantistoj ... kaj dum la tagmanĝa menuo en fama 'Hofbräuhaus', gustumu la bierojn!

München - la urbo de biero

▲ la gotika urbodomo kun 'Mariensäule'

▲ 'Frauenkirche', la fama preĝejo kun la du turoj

▲ 'Esperanto-Placo' tuj apud la 'oktobra festo'

30 dec 2010
9.00 h

Biletoj:
35 € infanoj
45 € plenkreskuloj

fotoj (4): K. Breuninger

▲ 'Theresienwiese', kie okazas la mondfama 'oktobra festo', la plej granda popola festo

◄ 'Hofbräuhaus' la plej fama gastejo en la urbo, kie nia grupo tagmanĝos bavaran specialaĵon ....